**Kunveno: merkredon la 16an de januaro 2019a**
**je la 20.00 h. en "De Uitwijk",**
**Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven**
**tel. 040-2450590**

# Skrablo

Nia kutima programo en januaro...

Unue ni traktos la diversajn raportojn pri la antaŭa jaro, kaj la planojn por la nova jaro.

Post tio la tuta klubo dividiĝos en (tri aŭ) kvar teamoj; ĉiu teamo ludas komune. Ni ludos la konatan ludon *Skrablo*, sed en Esperanto.
Tio signifas ke vortoj estu en Esperanto, finaĵoj ne nepras por fini la vorton (tiel eblos aldoni pliajn literoj, ekzemple por prefiksoj kaj afiksoj), estas literoj kun supersignoj, kaj la ĵokeroj surhavas la verdan stelon. Cetere la ludo funkcias precize kiel en ĉiuj aliaj lingvoj.

